

utiligas maksimume kaj urĝe la modernan teknologion? Aktuale ili nur alvokas nin, ke ni detenu nin de interhoma kontakto kaj laŭeble restu hejme. Al mi ŝajnas, ke ili emas taksu la konsilojn de sciencaj fakuloj negravaj kaj prokrasti necesajn decidojn. Ĉu ili ne havas sufiĉan kapablon, aŭ nur estas maldiligentaj? Mi bedaŭras.

1) K. Ikeda *et al.*, Ann. Rep. Tokyo Metr. Inst. P. H., Vol. 56, 369-374, 2005, Tokia Instituto de Publika Sano, <http://www.tokyo-eiken.go.jp/sage/sage2005/>

2) Nacia Instituto de Infektaj Malsanoj,

<http://idsc.nih.gov/jp/disease/influenza/pandemic/QA02.html>

3) Ministerio pri Sano, Laboro kaj Bonfarto, [https://www.mhlw.go.jp/stf/covid-19/kokunainohasseijoukyou.html#h2\\_1](https://www.mhlw.go.jp/stf/covid-19/kokunainohasseijoukyou.html#h2_1)

(要約) 約 100 年前のスペイン風邪、現代の新型コロナウイルス感染症。数波に及ぶ流行の繰り返しや人々の感染対策の様子はほぼ同じだ。違いはこの間の医学、科学技術の大きな進歩である。今は高感度の検査法やワクチンがあるが… (秋谷 秀夫)

## Fondita: Internacia Esperanto-Arkivo

**Bert BOON**

Internacia Esperanto-Arkivo, mallonge IEA, estas fondita en la 22-a de januaro 2021 kaj oficiale asocio sen profitdona celo (ASPC) ekde la 25-a de januaro 2021, en Belgio. La tri administrantoj estas Bert BOON, Roland ROTSAERT kaj Marc VANDEN BEMPT.

Ĝi originas el la persona kolekto de Cesar VANBIERVLIET (1905-1992), kiu sukcesis lokigi sian personan Esperanto-kolekton en la urba biblioteko de Kortrijk. Post la morto de Cesar, la kolekton akceptis lokaj biblioteko kaj arkivoj kaj la restanta parto de la kolekto kuniĝis kun la kolekto de Marc VANDEN BEMPT. En 2014 kaj precipe en 2019 estis interŝanĝoj kun la biblioteko en Herzberg, al kiu iris granda nombro de duoblaĵoj. En la jaroj

2010-2020 ekestis kontaktoj ankaŭ kun bibliotekoj en Hispanio, Brazilo, Japanio kaj Francio pri interŝanĝado. Tion ni povas do konsideri la kunigitan kolekton “Vanden Bempt – Vanbiervliet”.

La ideo pri IEA ekestis jam komence de la 2000-aj jaroj, sed pliaktiviĝis en 2016 post kontaktoj kun japana biblioteko. En oktobro 2019 la plano iĝis pli konkreta; tiam en limigita rondo estis lanĉita la ideo de asocio kaj pluraj eblecoj estis esploritaj.

Fine estis decidita fondi asocion senprofitcelan laŭ belga leĝo kaj provizora konservado en propra domo. La baza ideo malantaŭ la kreado de jura persono estas unuflanke krei juran bazon por la kolekto de la Fondaĵo Vanbiervliet kaj aliflanke apartigi la kolekton Marc VANDEN BEMPT

de lia fizika persono.

La Arkivo celas: kolekti, arkivi, protekti, administri kaj fari alireblaj librojn, revuojn kaj aliajn dokumentojn en kaj pri Esperanto kaj planitaj lingvoj, en sia originala formo. Tiu ĉi arkivo celas konservadon kiel heredaĵo, por nelimigita tempodaŭro.

Por atingi ĉi tiun celon, la asocio altiras arkivajn dokumentojn diversmaniere. Ĝi provizas medion (posedaĵon aŭ luadon) taŭgan por gardado en optimumaj kondiĉoj koncerne klimaton, sekurecon kaj simile. Detala inventaro de la arkivaj dokumentoj estas daŭre ĝisdatigata. Principe ne disponeblas pruntado, la aliro eblas surloke aŭ per aliaj vojoj, ekzemple skano.

Provizore la Arkivo povas resti en la nuna loko en la centro de Belgio (tuj apud Leuven), sed ĝi serĉas novan ejon konstruitan aŭ konstruotan laŭ la specifaj postuloj por arkiva konservado por eterne.

Ĉiu persono (esperantisto aŭ ne) estas petata subteni kiel Amiko; Mecenato; Aĉetanto (de brokantaĵoj kaj "Brikoj"); eventuale Kuninvestanto kaj Volontulo

(ekzemple por ordigi kaj plivastigi la kolekton). Detalojn vi trovas en la retejo, ĉe <http://www.iespa.eu>.

De via subteno dependas la realigado de la celo!

(要約) 各種のエスペラント関連資料の収集と永久保存を目的とする文書館が、ベルギーの非営利組織として発足した。Cesar Vanbiervliet と Marc Vanden Bempt の個人蔵書をもとに成立したもので、現在はベルギー中部のルーヴェン近郊に位置する建物に蔵書を保管し、目録の作成・更新作業がおこなわれている。蔵書の貸出はおこなわず、訪問しての閲覧もしくはスキャンなどの方法で資料にアクセスできる。文書館に適した建物の建設のための支援者のほか、共同出資者やボランティア作業者を募集している。また、現在の目録 (<http://www.iespa.eu/docs/Katalogo-Revuoj.pdf>) に欠けている機関誌など、資料の寄贈も受け付けている。所在地は、Internacia Esperanto-Arkivo, ĉe Marc Vanden Bempt, Arnoudt Rulenslaan 10, 3020 Winksele, Belgio. (編集部)

---

## ☼☼☼ Pluke! ☼☼☼ (皆様も「これは」と思う言い方を見かけたら、編集部まで)

今回はエスペラント界での古典 *Karlo* (Edmond PRIVAT) から。今は注釈・対訳付きの本が 990 円で入手可能。

- (la knaboj) havas sian ĉapon **flanke**: 帽子をはずにかぶっている。
- (la knaboj) havas sian ĉapon **malantaŭe sur la kapo**: 帽子を**あみだ**にかぶっている。
- **nekristana kolero**: 「キリスト教徒的ではない怒り」ということだが、ここでは、キリ

スト教徒が持つべき寛容性を欠いた怒り、というニュアンスで、「キリスト教徒にあるまじき怒り」とも訳せるだろう。

- **invitoj de kaj al la familio Davis**: 「ダビス家からの招待とダビス家への招待」ということだが、「ダビス家は招待したりされたり」とも訳せるだろう。

(編集部)